# Informilo

MONATA REVUO DE **FLANDRA ESPERANTO-LIGO**
MAANDBLAD VAN DE **VLAAMSE ESPERANTOBOND**

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

Jarkolekto / Jaargang 3 N° 5 jun.83

Notendaj datoj kaj faktoj.

18 06 1983 ekde 14.00 h. en ESPERANTO DOMO, Antwerpen
kunveno por grupaj respondeculoj, organizita de nia Komisiono pri Intergrupa Agado

25 06 83 ekde 10.00 h. same en ESPERANTO DOMO en Antwerpen :
lasta kursotago el la kadrokursoserio 1982/1983
Temo : Historio de Esperanto internacie kaj nacie.
Gvidos : Fernand Roose

Numero estas la lasta antaŭ la someraj ferioj. Ni revenos en septembro, pli ol verŝajne post nia kongreso, kiu okazos en Leuven de la 9-a ĝis la 11-a de septembro.
Por pliaj detaloj kaj informoj, kontaktiĝu kun Marc Van den Bempt, Duisburgsestraat 12, 3030 Leuven-Heverlee.

Bonvolu ne forgesi tiun gravan eventon dum kiu, speciale nun, ni ĉiuj decidu pri tre gravaj aferoj, de kiuj povas dependi multo por nia estonta agado.

Dankon, kaj ĝis tiam.

---

I N F O R M I L O . Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Aperas ĉiumonate, krom en julio kaj aŭgusto.
Jarabono : BF 150,-

| | |
|---|---|
| FLANDRA ESPERANTO-LIGO | Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN - 03/234 34 00<br>Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 |
| Prezidanto<br>Informado/Planado/Agado | Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT - 03/666 62 66 |
| Estrarano pri Financoj | Erik D'HONDT, Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM 053/77 44 97 |
| Sekretario | Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 1<br>2510 MORTSEL /449 50 06 |
| Direktoro de GCA<br>Librotenado | Paul PEERAERTS, Kloosterstraat 35<br>2000 ANTWERPEN |
| Junularo | Kristin TYTGAT, St. Hathebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL 03/449 50 24 |
| Intergrupa Agado | Hilde Van INGELGEM-VANDRIESSCHE , Arbeidstraat 21<br>9300 AALST<br>Trees DOOMS, Knaptandstraat 36<br>2700 St. Niklaas |
| Provincaj prezidantoj | Brabanto : M. Th. HENQUINEZ, Lipsestraat 166<br>2991 TILDONK<br>Limburgo : Guido SCHROEYERS, Helzoldstraat 113<br>3558 HELCHTEREN 011/53 64 10<br>Okc. Flandr.- Roland ROTSAERT, Visspaanstraat 97<br>8000 BRUGGE 050/33 00 04 |
| Kadrokursoj | André STAES, Jan Denucéstraat 1<br>2020 ANTWERPEN |
| Literaturo/Eldonoj | Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2<br>2000 ANTWERPEN |
| Gazetara Servo | Herman k. Annie DECEUNINCK-BOLLAERT<br>Lusthuizenlaan 1 b.4, 1500 HALLE |
| Sciencoj | Wim DE SMET, Hertendreef 12<br>2180 KALMTHOUT |
| Cibernetiko | Willy HUYBRECHTS, Rozendreef 33<br>2180 KALMTHOUT |



# P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de sabato 4-a de junio 1983 en Leuven, Konservatorio.

Ĉeestas : Jules Verstraeten (JV), Erik D'Hondt (ED), Hilde Vaningelgem (HVI), Marie Thérèse Henquinez (MTH), Trees Dooms (TD), Paul Peeraerts (PP), Kristin Tytgat (KT), Marc Van den Bempt (MVDB), Jan Bovendeerd (JB)

Senkulpigon petis : Edward Symoens kaj André Staes, ambaŭ al Vlaardingen por partopreni la konferencon pri la jubilea jaro.

Gvidas kaj protokolas : JB

Malfermo : 10.30 h.

## T A G - O R D O

1. Rilate al la protokolo pri la kunsido de 07 05 83, HVI rimarkigas ke ankaŭ ŝi petis senkulpigon, io kio ne aperas en la protokolo.

2. Raportado de la estraranoj :
El ĝenerala vidpunkto JB proponas raportadi nur pri la taskoj rezultantaj el la protokolo de la antaŭa kunsido por eviti perdi tempon pro nuraj komunikoj, kiuj fakte apartenas al la diversaĵoj.
Aprobite.

2.1. SONORILO : JV raportas ke li kontaktiĝis kun la aliaj administrantoj kaj ankaŭ telefonis al Gregoire Maertens. Tiu ĉi promesis sendi detalan leteron tiel al la prizorgantoj de SONORILO, kiel al FEL. Tamen neniu alvenis, almenaŭ JB nenion ricevis.

2.2. Publikigo de la estrarŝanĝo en la ŝtatgazeto : JB faris la neceson

3. Kongreso en Leuven.

3.1. Triksini estante tro multekosta, la kongresorganizantoj kunmetis pli malmultekostan kaj ne malpli interesan programon.

3.2. La libroservon prizorgos ESPERANTO 2000 mem, konsiderante la malfacilaĵojn kun SONORILO.

3.3. Kunsidoj : nek BEF nek APE profitos de la kongreso por okazigi ĝeneralan kunsidon
Dank'al tio, FEL disponos pri pli da tempo por sia ĝenerala kunsido, kiu okazos dimanĉon de 09.30 - 12.00 h.

MVDB sin demandas ĉu interese estus okazigi seminarion por la grupaj respondeculoj.
Jes certe, malgraŭ la planita kunveno de 18 06 1983 en Antwerpen.

3.4. Manĝoj : okazos 3 manĝoj en Alma, dum 3 aliaj estos preparitaj de la organizantoj mem.

3.5. Inaŭguro : festprelegos S-ron COPPIETERS pri Eŭropo.

Verŝajne ankaŭ alparolos la kongreson la urbestro de Leuven.
Supozeble la kongreso ankaŭ estos alparolata de la ceteraj ĉeestantaj organizoj.

4. PANORAMA / INFORMILO
JB faris kalkulon rilate al la kostprezo de INFORMILO. Fakte ne estas vera ŝparo, malgraŭ la abonigo. Male, la kostoj estas pli altaj.
Ni memoru ke INFORMILO kreiĝis por ŝpari el la afranko. Tiam la protokoloj estis dissenditaj kiel presaĵoj al 40-o da personoj. Nun INFORMILO-n ricevas 140-o da personoj, el kiuj proksimume la duono abonas ĝin. Tamen, se la protokoloj fariĝis stencile, INFORMILO estas presita. La farad-kostoj do konsiderinde plialtiĝis.
Tial JB sin demandis ĉu ne estus interese enkorpigi INFORMILO-n en ESPERANTO PANORAMA.
Laŭ PP la nura ŝparo estus la afranko, ĉar ja la tekstoj devas esti presitaj ktp.
Plie, INFORMILO ne estas nur protokola sed samtempe informa pere de diversaj komunikoj, kiuj, se ne, ankaŭ devus esti dissenditaj presaje. Do la esperata ŝparo estas nur ŝajna.
Tamen ŝparo estas ebla se la numerado de la paĝoj estas seninterrompa kaj plie, se la protokola parto ne plu devas aperi sur kolora papero.
JB do venonte aplikos seninterrompan numeradon kaj ne plu apartan protokolan parton sur kolora papero.

5. KOTIZOJ
Tro frue estas por jam havi rezultaton el la provo de LA VERDA STELO.

6. LIBROSERVO SONORILO
Nia antaŭa sciigo al la administrantaro de SONORILO, ke ni lasus al ĝiaj respondeculoj ĝis fino de majo por enordigi la aferojn, ne havis sekvon.
Post longa diskutado, decidiĝas :
1. sendi leteron al la administrantaro de SONORILO por anonci nian retiriĝon kaj por postuli repagon de nia parto el la kapitalo (1/2 ?)
2. inviti FLEJA-n al komuna kunsido por esplori kiamaniere sin organizi por ne trovi novan problemon
3. antaŭmeti la aferon al la administrantaro de FEL okaze de la ĝenerala, dumkongresa kunsido en septembro.

Fino : 11.50 h.

--------------------

# flandra esperanto-ligo

Aalst, 12-a de junio 1983 - Aperitiv-koncerto.

Koran dankon ni ŝuldas al ĉiuj kiuj iamaniere kunlaboris en la organizado de tiu ĉi koncerto.

Sincerajn gratulojn ni ŝuldas al la artistoj kiuj regalis nin per elstara kaj bonega muzikprogramo.

La koncerto komenciĝis je la planita horo kaj konsistis el :
- Sonato en A de Joh. Chr. Bach
  (klavceno kvarmane fare de Kristiaan Vaningelgem kaj Petro De Smedt)
- Sonato en E de G.F. Händel
  (Fluto kaj klavceno fare de Frans Hendrickx kaj Kristiaan Vaningelgem)
- Sonato en Bes de W.A. Mozart
  (klavceno kvarmane fare de Petro De Smedt kaj Kristiaan Vaningelegem)

La muziskistoj eligis intensan aplaŭdon el la publiko.
Sekvis tre agrabla komuna manĝo preparita de membroj de la Aalsta grupo.
Poste okazis agrabla promenado tra la urbo kaj la urba parko. La festado finiĝis en la ĝardeno de la familio Vaningelgem.
Ĉi programo estas la unua kadre de la plano ellaborita de la laborgrupo pri financa resanigo de FEL kaj organizita de la Aalsta Esperantogrupo LA PIONIRO.
Ĝi baziĝas sur la solidareco, unu el la ĉefaj elementoj por la konstruado de bone funkcianta organizo.

La nuna ekonomia krizo montras al ni denove la vojon al la mem-mastrumado.
Ja en la "ora" periodo de la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj, la ministerio pri Kulturo kaj nacia Edukado iom dorlotis la kulturajn organizojn, forprenante de ili la plej premajn financajn ŝarĝojn. Tio kompreneble multe helpis al ili, sed, kvankam la ministerio nomiĝas "eduka", dorlotado fakte ne estas bona formo de edukado. Pro la plifaciligita mastrumado, verŝajne la batalpreteco malplifortiĝis, tiel ke ĉe la apero de la ekonomiaj malfacilaĵoj la iam dorlotitaj organizoj sin trovis antaŭ gravaj problemoj. Nepre necesas reintensigi la batalpretecon kaj laborpretecon kaj komprenigi al ĉiu ke la organizo kiel tia pli kaj pli iĝas ĉies respondeco. La estraro jes devas gvidi la tuton, sed ĉiuj, tiel estraranoj kiel membroj, havas kiel taskon ĉiuj kune konstrui kiel eble plej bone funkciantan organizon kiun regas amikeco (paco), bona volo, solidareco (reciprokeco) kaj antaŭzorgemo. Per tiuj kvar elementoj ni devas sukcesi, malgraŭ ĉio.

Danki'ni devas do ĉiujn kiuj komprenis tion kaj kiuj en plena solidareco ebligis tiun ĉi plej agrablan tagon.

Esperu ni ke Aalst ne estos unikaĵo.

Nome de FEL
JB

**Baldaŭ aperos la**

# MANLIBRO por ESPERANTO-AKTIVULOJ

en bela plasta kovrilo kun centoj da paĝoj pri ĉio, kion la aktivuloj kaj grupoj de la Esperanto-movado devas nepre scii.
La libro respondos inter alie tuj la jenajn demandojn:

- Kie oni povas akiri informilojn pri Esperanto?
- Kie mi povas akiri librojn en Esperanto?
- Ĉu mia grupo povas ricevi subvenciojn?
- Ĉu mia grupo devas pagi impostojn se ĝi organzias balon?
- Kiel funkcias tiu Esperanto-Centro en Antverpeno?
- Kiel mi povas organizi ekspozicion pri Esperanto?
- Kia estas la strukturo de FEL?
- Kie mi trovos bonan preleganton por nia Zamenhof-vespero?

Tion ĉi, kaj multon alian, vi trovos en la „Manlibro por Esperanto-Aktivuloj".
Tiu ĉi libro konsistas el apartaj folioj en praktika bindilo. La eldonantoj daŭre liveros novajn paĝojn, tiel ke la tuta verko restas ĉiam ĝisdata. Se, ekzemple, hodiaŭ aperas en la Belga Ŝtatgazeto nova leĝo kiu koncernas la Esperanto-grupojn, certe post kelkaj semajnoj vi povos legi la detalojn pri ĝi en la novaj folioj de via manlibro.
Mendu la manlibron jam nun. La unua baza verko, tio estas plasta ringodosiero kun minimume 100 folioj, kostas 695 fr. (inkl. sendokostojn kaj AVI). Mendu ĝin pagante 695 fr. al konto 402-5510531-55 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, kun mencio „Manlibro por Esperanto-Aktivuloj".

***Jen denove servo de FEL!***

## Servoj de FEL 1.3.1.2

### Revuoj 1.3.1.2.1

Por plifaciligi la abonadon de revuoj, oni povas mendi la plej gravajn pere de *Flandra Esperanto-Ligo* (FEL). Ĉi-sube vi trovos liston kun mallonga priskribo kaj la aktualan prezon en belgaj frankoj. Grupoj de FEL povas en multaj okazoj ricevi maklerajôn se ili peras la abonadon de tiuj revuoj. Vidu pri tio ĉapitron 1.3.1.1.3 „Membrosistemo de FEL".

**Esperanto** estas la oficiala organo de *Universala Esperanto-Asocio*. Temo: la Esperanto-movado. Aperas monate. Lingvo: Esp... ne facila. Formato: 19x26,5cm. 20p. Prezo: 360 fr.

**Esperanto en Belgio** estas la oficiala organo de *Belga ...anto-Federacio*. Temo: la Esperanto-movado en Belgio. Apera... cipe monate; praktike du- aŭ trimonate. Lingvo: Esperant... neperfekta. Formato: 14,85x21cm. 12-20p. Prezo: senpaga. La s... okazas aŭtomate al tiuj kiuj abonis la revuon „Esperanto" pere de... aŭ APE. Aliaj povas peti ĝin de BEF.

**Esperanto-Panorama** estas la oficiala organo de FEL. Te... Esperanto kaj lingvaj problemoj. Aperas dumonate. Lingvo: ĉefe nederlanda. Formato: 14,85x21cm. 12-16p. Prezo: 100 fr. Membroj de FEL pli ol 16jaraĝaj ricevas senpagan abonon.

**Heroldo de Esperanto**. Privata eldonaĵo. Temo: Esperanto-movado. Aperas principe duonmonate, praktike ĉ. 18 fojojn jare. Lingvo: Esperanto, relative facila. Formato: 30x40cm. 4-8p. Prezo: 520 fr.

**Informilo**. Kadrorevuo de FEL. Temo: Esperanto-novaĵoj por aktivuloj. Aperas dumonate. Lingvo: Esperanto. Formato: 14,85x21cm. 8-20p. Prezo: 150 fr. Senpaga por Esperanto-grupoj de FEL.

**Jongeren Esperanto-Nieuws (JEN)** estas revuo de *Flandra Esperantista Junulara Asocio* kaj de Nederlanda Esperanto-Junularo. Temoj: lingvaj problemoj kaj Esperanto. Aperas dumonate. Lingvo: ĉefe nederlanda. Formato: 14,85x21cm. 12-24p. Prezo: 100 fr. Senpaga por membroj kaj subtenantaj membroj de FLEJA.

**Koncize** estas informilo de pluraj junularaj Esperanto-organizaĵoj. Temoj: junularaj kongresoj kaj renkontiĝoj. Aperas dumonate.



Du specimenaj paĝoj el la „Manlibro"



◊ Faldfolio F2 „De wereld wordt kleiner en kleiner". Formato 9,9 × 21 cm; 6p.; prezo ĉ. 2 fr. + sendkostoj; dukolora preso sur ovŝela papero. Iom luksa informilo kun bazaj donitaĵoj pri Esperanto kaj dupaĝa superrigardo pri la gramatiko.

◊ Faldfoliaro F3 „Korrespondentie-begincursus Esperanto". Formato DIN A5; 6p.; prezo ĉ. 2 fr. + sendkostoj. Informfolio pri la koresponda kurso de FEL plus unua Esperanto-leciono. Tre atentokapta.

◊ Faldfolio F4 „Bestelformulier voor lidmaatschappen, abonnemen-...boeken". Formato DIN A5; 4p.; senpaga. Provo helpi la legan-... a labirinto de kotizoj kaj abonoj. Kun aktualaj prezoj.

...folio F5 „De groene rekening". Formato DIN A5; 4p.; senpaga. ...por la fiksdataj mondeponoj de FEL (vidu en ĉapitro 1.3.1.2 la ...ri „Fiksdataj mondeponoj").

... A1 „Esperanto, tweede taal voor iedereen". Formato DIN ...prezo ĉ. 5 fr. + sendkostoj. Trikolora afiŝo (oranĝa, verda, ...infanoj dancantaj en rondo, kiuj reprezentas la homaron.

... A2 „Esperanto is...". Serio de 10 afiŝoj en formato DIN A4; po 1 p.; ĉ. 50 fr. por la serio + sendkostoj. Ĉiu el la dek afiŝetoj prezentas unu sloganon kun specifa eco de Esperanto.

◊ Broŝuro B1 „Esperanto, een Europese of een Aziatische taal?". Formato DIN A5; 36p.; ĉ. 70 fr. + sendkostoj. Interesa verko de Claude Piron pri la situo de Esperanto inter la izolaj, fleksiaj kaj aglutinaj lingvoj. Por interesitoj kun baza kono de lingvistiko.

◊ Broŝuro B2 „Esperanto, wat kan ik dáármee doen?". Formato DIN A5; 20p.; ĉ. 70 fr. + sendkostoj. Superrigardo pri la historio de Esperanto kaj pri ĝia nuna praktika utilo. Kun adresoj de diversaj asocioj.

◊ Broŝuro B3 „Flandra kaj Nederlanda Esperanto-bibliografio". Formato DIN A5; 92p.; ĉ. 150 fr. + sendkostoj. Listo de 516 libroj en la nederlanda lingvo pri Esperanto (do informlibroj kaj kursoj) troveblaj en la nederlandaj kaj flandraj bibliotekoj.

◊ Revuoj kaj flugfolioj. FEL kutime disponas pri troaj ekzempleroj de „Esperanto-Panorama" kaj pri aliaj revuoj kaj esperantlingvaj prospektoj. Tiuj ĉi estas riceveblaj senpage. La petinto pagas nur la afrankon.

◊ Informiloj en aliaj lingvoj ol la nederlanda. FEL normale posedas ankaŭ limigitan kvanton da folioj kaj broŝuroj en fremdaj lingvoj. Inte-

**ENHAVTABELO**

Parto de la enhavtabelo


**ENKONDUKO** . . . . . . . . . . 0
Enhavtabelo . . . . . . . . . . . .
Pri la formo de tiu ĉi verko . . . . . . .

**LA ESPERANTO-MOVADO** . . . . . . . . . . . .
La Esperanto-movado internacie . . . . . . . . . . . . . .
*Universala ESPERANTO-ASOCIO* (UEA) . . . . . . . . . . . . . .1
Aliaj internaciaj Esperanto-instancoj . . . . . . . . . . . . 1.1.2
La Esperanto-movado ŝtate . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1.2
*Belga ESPERANTO-FEDERACIO* (BEF) . . . . . . . . . . . . . . . 1.2.1
Aliaj belgaj movadaj instancoj . . . . . . . . . . . . . . . . 1.2.2
Nemovadaj instancoj en Belgio kiuj uzas Esperanton . . . . 1.2.3
La Esperanto-movado nacie . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1.3
*Flandra ESPERANTO-LIGO* (FEL) . . . . . . . . . . . . . . . . 1.3.1
Strukturo de FEL . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1.3.1.1
Organoj de FEL
Organigramo de FEL
Membrosistemo de FEL
Servoj de FEL . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1.3.1.2
Revuoj
Informiloj
Ekspozicimaterialo
Profesia helpo
Biblioteko
Gazetara servo
Libroservo
Kadrokursoj
Esperanto-kursoj
Konsilantoj de FEL
Prelegantoj
La Esperanto-Centro . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1.3.1.3
*Flandra ESPERANTISTA JUNULARA ASOCIO* . . . . . . . . . . . 1.3.2
La Esperanto-grupoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1.3.3






P R O T O K O L O

pri la Brabanta ĝenerala provinca kunsido de sabato 4-a de junio 1983 en Leuven

Ĉeestas krom la ĉeestantoj de antaŭtagmeze : Kris Suykens, Herman Van Eyndt, Angelos Tsirimokos, Gh. Jacobs, André Mertens-Goossens, Marc Demonty

Sama scenaro kiel en la antaŭaj provincaj kunsidoj.

1. PP klarigas la funkciadon kaj financadon de la Esperanto Centro, la dividon de la Esperanto-domo kaj de la tiurilataj kostoj.
   Aldonenda estas, ke nun Esperanto-domo ankaŭ loĝigas la sekretariejon de la UEA-organizo de la jubilea jaro. Respondeculo : André Staes.

2. JB pledas por provinca centraligo de la agado kaj administrado. Evidentiĝas tamen ke, ĉar Brabanto en la nuna momento nombras nur 2 lokajn grupojn: Leuven kaj Bruselo kaj ĉar ĉi lasta havas apartajn aliĝkondiĉojn, centraligo de la administrado kaŭzus ankoraŭ pli da malfacilaĵoj. Necese do estas rezigni pri tiu plano. Ĝi povos esti denove priekzamenata kiam nova grupo/kerno ekestos en la provinco.

3. HVI atentigas pri la intergrupa agado kaj :
   - anoncas kunvenon por grup-estroj je 18 06 1983 en E°-domo en Antwerpen
   - invitas al la aperitiv-koncerto en Aalst je 12 06 1983 favore al FEL

4. Rilate al ebla plibonigo de la agado, S-ro Jacobs opinias ke Leuven formas preskaŭ insulon en la movado : loka kerno kaj aro da individuaj membroj dise en la provinco. Li demandas ĉu ne eblas ekhavi liston de ĉiuj brabantaj esperantistoj por ebligi personan kontaktiĝon.
   Kompreneble tio eblas pere de la Centro.

5. Sugestoj

5.1. Por doni pli klaran bildon de la kondiĉoj en kiuj ni devos labori, JB klarigas la enhavon de la nova dekreto pri ŝtata subvenciado (bv relegi la jarraporton en la marta/aprila numero de INFROMILO)
Necese verŝajne estos lerni vivi sen subvencioj.
KT trovas ke ĉiukaze ni devas ne esti sklavoj de la subvencioj kaj, se la kondiĉoj estas tro severaj, ke ni rezignu pri ili. Nia ĉies ĉefa tasko ja estas aligi pli da membroj.
PP opinias ke ni klopodu akiri kiel eble plej multe da financaj enspezoj.
La kondiĉoj de la dekreto ja ne estas nesurmonteblaj.

5.2. Kiel ajn estu, por plu profiti de la subvencioj nepras ke ni ĉiuj kunaj, t.e. ĉiuj grupoj kune kun FEL-estraro agadu en komuna programo por la ĝenerala bono de nia tuta movado.
Verŝajne ni trovu apartan estraranon por okupiĝi nur pri la programoj.

5.3. Tial cetere la planita kunveno de grupaj respondeculoj je 18 06 1983.

Dum tiu kunsido ni ĉefe priesploru la diversajn eblecojn pri komuna agado.

5.4. Intertempe ni ĉion eblan faru por aligi kiom eble plej da novaj membroj kaj pensu pri la necesa post-zorgado de la membraro.

5.5. Ankaŭ necesas akiri kiel eble plej da (multe) aktivuloj.
Tial JB denove insiste petas atenton al la kadrokursoj.

5.6 Rilate al programoj : ili estu interesaj. Se tiaj, ili jam altiras pli da homoj kaj plifaciligas la personajn kontaktojn.

Por ebligi agrablan kunestadon dum kiu eblas interesa interbabilado, JB fermas la kunsidon je 15.50 h.

---



K O M U N I K O J

En la organigramo kiun vi trovis aneksita al la antaŭa numero de INFORMILO, bonvolu :

- kompletigi jenajn telefonnumerojn :
  Jules VERSTRAETEN (Honora Komitato) : 03/827 66 43
  Ivo DURWAEL (Antwerpen) : 03/440 30 92
  Henri BOLJAU ( " ) : 03/235 95 45
- aldoni al la provinco Antverpeno :
  Turnhout : R : Gorik DUYCK, Harmoniestraat 47, 2300 TURNHOUT

--------

H. VAN INGELGEM kaj T. DOOMS faras sian eblon por plibonigi kaj pliaktivigi la movadon en nia lando. Ili meritas plenan apogon.
Permesu do al ni speciale insisti je serioza kunlaboro kaj helpo, bone sekvante iliajn alvokojn.

Ili, kiel ankaŭ FEL-estraro, sincere dankas pro via komprenemo.

----------

André STAES, komisiito pri kadrokursoj, preparas novan kursoserion por la venonta agadperiodo 1983/1984, komenciĝonta en septembro/oktobro.
Ĉiu, kiu havas iajn rimarkojn kaj/aŭ sugestojn, bonvolu ilin komuniki al André.

Koran dankon.

----------

Demando kaj respondo.

Venis du reagoj el la franclingva landparto rilate al niaj protokoloj, specife pri tiuj partoj kiuj pritraktas la rilatojn FEL/SONORILO.

Ambaŭ riproĉas al ni "ataki" la libroservon, atentigante ke la pasintjara gajno estis dividita en egalajn partojn "malgraŭ la pli grava aĉetado far la franclingva esperantistaro".

Unu el ambaŭ eĉ arogas al si la rajton fari tujan konkludon : "... temas pri monafero ! Via Junularo volas gajni monon, kiel ili faris dum la UK vendante en Esperantodomo.."

Jen, do, eĉ la junularo implikita en afero, kiu tute ne koncernas ĝin !

----

Antaŭ ĉio, kelkaj rimarkoj, ĉefe por tiuj el nia membraro kiuj povus miri pri la fakto ke aliaj-ol-FEL-anoj scias pri niaj estraraj decidoj kaj diskutoj.

Nu, ekde ĝia ekzisto, la estraro de FEL decidis adopti politikon de malfermiteco, politiko de honesta malkaŝemo, de serioza kunlaboremo kun ĉiuj. Tial decidiĝis komuniki niajn protokolojn kaj novajojn ankaŭ al la de ni konataj Esperanto-organizoj en Belgio, ĉefe al BEF (Belga Esperanto-Federacio) kaj APE (Asocio por E°) Kompreneble tio okazas informcele,el kio sekvas ke principe ni eĉ ne devus respondi al la faritaj riproĉoj. Sed tamen.
Tamen ni volas respondi, eĉ se nur por refuti argumentojn ne verajn.

Unue, ke la franclingva esperantistaro aĉetis pli da libroj ol la flandroj estas mito, iam disvastigata, ĉu intence ? ĉu por malutili al la flandra imago ?
La vero estas ke,laŭ kontrolo de la pasintjaraj kontoj de SONORILO, eble la mendokvanto franclingva estis pli granda, sed ke la vendociferoj tute ne superis la flandran !
La konkludo de la dua reaginto ŝajnas al ni tiel ridinda, ke ĝi eĉ ne bezonas respondon. Cetere, kial (denove) miksi FLEJA-n en la aferon ?

La realeco estas, ke tute ne temas pri monafero. Ni jes malkovris evidentan kontraŭ-agadon kontraŭ FEL kaj -ĉefe unu el ĝiaj - grupoj. Tio, kion la estraro de FEL faras estas nenio alia ol defendi FEL kontraŭ ĉiaj eblaj atakoj aŭ malutiloj fare de kiu ajn !
Pli da detaloj ni nun ne donos. La afero estos detale pridebatita okaze de nia septembra kongreso.

Tria - fakte flanka rimarko - estas ke ĝenerale oni konsideras la kunmetinton de la revuo aŭ la protokolinton de estrarkunsidoj LA respondeculo, dum temas pri nura raportado de tio kio okazis en kunsido. Do, neniu persona.

------

Tamen, miajn personajn opiniojn mi neniel kaŝas, ankaŭ ne nun, je mia propra kaj tute persona respondeco.

Laŭ mi ĉiu estrarano kaj eĉ ĉiu membro de FEL havas kiel taskon defendi la interesojn de FEL sur ĉiuj niveloj. Mi povas akcepti ke oni malbonon diru, kontraŭagadu aŭ eĉ kalumniu,se nur tio okazu ekster nia kampo. Sur nia propra teritorio decidu ni !
Por vivi en bonaj rilatoj kun niaj najbaroj, ni unue ne malutilu al ili kaj, due, ne miksu nin en iliaj privataj aferoj.
Kiu ne konsentas sin anoncu.
Jen.

-----

Kaj nun, ĝis re.......o en septembro.
Fartu bone, kongresu bone kiu kongresos kaj havu agrablan kaj sunoplenan feriadon.

JR